atentu. korespondenco

3-a Jaro. N-o 117



23. Decembro 1926

ESPERANTO JE LA SERVO DE L' TUTMONDA PROLETARO

SENNACIULO

OFICIALA ORGANO DE SENNACIECA ASOCIO TUTMONDA

Redaktanto: E. LANTY 14, Avenue de Corbéra, Paris-XII^e	Sidejo de Ekzekutiva Komitato de SAT 23, Rue Boyer, Paris-XX^e	Administranto: R. LERCHNER Colmstrasse 1, Leipzig O 27


KION LA BRITIA BARAKTO INSTRUAS

Post 30-semajna suferego kaj heroa protestado, la britia karbministaro devas cedi. La postulo de la karbmastroj sukcesis rilate al malaltigo de salajro kaj plilongigo de la labortago. La Nacia Federacio rezignis sian funkcion kaj tiel la apartaj distriktoj estas en tre malbona pozicio por intertrakti. Plejparte la labortago estas nun 8—8½ horoj laŭfakte. La salajro ekzemple en Skotlando fiksiĝis je nur 20% super la normo de la jaro 1914; kompare la kosto de vivrimedoj restas 79% pli alte. Triono el la karbministoj restas senlaboraj kaj tiu nombro certe kreskos, kiam ne plu ekzistos la nuna eksterordinara manko de karbo.

Malvenko povas esti la unua paŝo al fina sukceso. Necesas nur klare kompreni ties kaŭzon. Interalie oni povas citi, ke la Federacio estas nur kolekto de sinregaj apartaj distriktaj asocioj. Kelkaj karbministoj mem revenis al la karbminejo — proksimume triono ĝis la lastaj semajnoj. Aliaj en lokoj, kie la karbtavoloj preskaŭ elpuŝiĝis el la tero, elhakis karbon kaj vendis ĝin. Grandan malhelpon kreis la reakciaj estroj Hodges kaj Spencer, kiuj publike antaŭe cedis la 7-horan labortagon. Sed plejparte la britiaj karbministoj mem staris firme kiel roko.

* * *

La respondeco pri la ĉesigo de la subtenanta Tutlanda striko (majo 3a—12a) diskutiĝos ĉe plena kunveno de la Ekzekutivoj de ĉiuj sindikatoj. Nun ĝi ja ne povis esti plene pritraktata. Komprenêble tiu ĉesigo kuraĝigas la Registaron, ĉar Baldwin (Bolduin) konsciis pri la dividoj inter la sindikatestroj. La protesto de la karbministoj ŝajnas esti malgranda afero post la fino de la mirindaj kaj neforgeseblaj "Naŭ Tagoj". Baldwin hipokrite ŝajnigis esti cedema, sed fine proponis la plej malbonajn kondiĉojn — eĉ pli fiajn ol la karbmastroj mem. Certe



Kaj tamen la ministoj staras firme kiel roko.

estas nur 4½ milionoj da laboristoj el 12 milionoj, kiuj organiziĝis, sed se tiuj estus daŭrigintaj sian helpon eĉ dum unu semajno, kredeble ni nun ne lamentus (ĝemegadus) tragedion. Alilandaj K-doj certe ne povas kompreni, kiel la justa peto de la karbministoj por modesta salajro ne trafis la subtenon de ĉiu sindikatano kaj persono. Sed ili memoru la hipnotigon de la tradicio, de la edukado kaj Eklezio en tiu ĉi malrapide evoluinta lando. Ĉiutage vendiĝas 10 000 000-ekzemplere kapitalistaj ĵurnaloj; kompare la laborista ĵurnalo vendiĝas nur je 500 000 ekz. Ĉiudimanĉe 12 000 000 homoj tie ĉi aĉetas kapitalistan ĵurnalon, sed nur proksimume 80 000 aĉetas *Sunday Worker* (Dimanĉa Laboristo). La kapitalistaj ĵurnaloj mensogis daŭre kaj atakis ĉiumaniere la karbministaron. Grava kaŭzo ankaŭ estis bedaŭrinda manko de solidareco sur la internacia kampo. La usona, germana, holanda, pola kaj aliaj karbministaroj fariĝis **strikrompantoj!** Vane la britia karbministo suferis, ĉar ekzemple en septembro envenis 5 milionoj da tunoj da karbo alilanda. La britiaj kapitalistoj hontinde vendis tiun karbon je duobla prezo.

Ĉu necesas substreki la instruon pri urĝeco de mondskala solidareco por la Laboristaro. Celi nacian liberiĝon estas utopio. Tio estus por ni, SAT-anoj, forta instigilo, por ke ni laboru pli energie. Debeta la afero ne tute estas. Certe severe senkompatan edukadon ricevis 1 miliono da britiaj karbministoj kaj iliaj edzinoj kaj infanoj pri la vera karaktero de l' kapitalismo. La Mondskala monhelpo kreskigis supernacian senton. Krom privataj kaj lokaj donacoj kaj multe da laboro en komunaj manĝejoj, botriparejoj ktp., la centra kaso jam ricevis 1 843 839 sterlingajn funtojn. La britia Laboristaro neniam forgesos, ke el tiu sumo, 1 150 000 venis de siaj sovetiaj fratoj, kiuj ankoraŭ sendas helpon je 40 000 funtoj. Laŭ Marks la veraj fruktoj de laboristaj baraktoj ne estas en tuja rezulto sed en la kreskanta unueco. Certe la kapitalistoj tie ĉi iom pripensos antaŭ ol ataki senkaŝe la laboristojn. Solidareco kreskas el sufero.

Post "Nigra Dimanĉo" en Sovetio venis Oktobro. Ni konstruu tutmondan organizon, necesan por tutmonda proletara venko.

London, 3-XII—26. *(488.)*



Kio okazis en Nederlanda Indio?

Nederlando estas kolonia regno. Ĉi havas en Oriento la t. n. Nederlanda-n Indio-n. Gigantajn profitojn, *du miliardojn da* guldenoj, akiras ĉiujare nederlandaj kapitalistoj el ĉi tiuj riĉaj landoj.

Sed malbonfartas la loĝantoj de Indio mem, la indiĝenoj. Iam ili vivis kontente en siaj vilaĝoj, prilaboris siajn rizkampojn kaj vivis per ties produktoj. Venis la kapitalismo eksterlanda. Aranĝis grandajn plantejojn por kafo kaj kaŭĉuko. Konstruis sukerfabrikojn. Forpelis la indiĝenojn de iliaj grundoj. Nuntempe laboras en sukerfabrikoj kaj havenoj 15% de la India popolo, 20% kiel kulioj[1]) en plantejoj; nur 50% estas ankoraŭ kamparanoj, sed malriĉaj. Malaltegaj estas la salajroj, altaj la impostoj, longegaj la labortempoj. Tiel la registaro, kiel la entreprenistoj elsuĉadis la malriĉan Javanon[2]).

Ĉi tiuj situacioj favoris la trapenetron de progresemaj ideoj. Organiziĝis profesi-unuiĝoj. Okazis strikoj. La komunista partio akiris simpation de l' indiĝenoj.

La registaro brute kontraŭis. Perforte finigis la strikojn. Malpermesis kunvenojn. Konfiskis gazetojn. Arestis redaktorojn. Malliberigis kaj ekzilis gvidantojn. Klopodis sufoki la timigan komunismon. Sensukcese. Okazis la malo.

Burĝaj gazetoj diskonigas: Komunista ribelo en Indio! Kio okazis? La senfina toleremo de la pacience suferanta India popolo finiĝis. En diversaj lokoj malbone armitaj trupoj el indiĝenoj atakis registarajn konstruojn, (malliberejon, telegrafoficejojn k. s.) kaj mortigis regantojn. Spontana reago al la teroro de la regantoj kaj ties servantoj, naiva klopodo de revenĝo kontraŭ la turmentantoj. Signo, ke ne senfine daŭros la regado de la blankaj kapitalistoj super la brunaj sklavoj.

Sed ĉi tiun klopodon la registaro baldaŭ subigis. Multaj estis mortpafataj. Aliajn oni arestis. La tuta regiono de l' ribelo estas "purigata". Ĉiuj "komunistaj" gvidantoj estas ekzilataj al Nov-Guineo (insulo kun malsaniga klimato).

Ĉi tiu ribelo ne estis organizita de komunistoj. Sed tamen la komunistoj staris ĉe la flanko de la ribelintoj.

Nederlanda Kompartio jam organizis protestkunvenojn. Ĉe ili ankaŭ parolas nia India K-do Semaoen (Semaun). Oni postulas: liberigon de la arestitoj, tujan revenon de la trupoj senditaj por aresto de la ribelintoj, tujan amnestion[1]) por ĉiuj politikaj kondamnitoj, denuncitoj kaj ekzilitoj, subtenon de la familioj, kiuj havis malprofiton de la ribelo (t. e. tiaj, kiuj perdis siajn prizorgantojn), aranĝon de esploro pri la kaŭzo de la ribelo de komisio enhavanta i. a. indiĝenojn kaj maldekstrumajn laboristojn. *670*

[1]) *kulio* = india aŭ ĉina laboristo, kiun oni laborigas en kolonioj (Verax).

[2]) *Javano* = loĝanto de la India insulo Java, ankaŭ uzata en pli ĝenerala senco: loĝanto de Indio.

[1]) *amnestio,* ago de registaro, kiu konsiderigas punindan agon kiel neokazintan kaj malebligas aŭ haltigas la persekutadon aŭ neniigas la kondamnon (Verax).



Letero el Usono de germana enmigrinto

Kara amiko! Mia nova hejmo lokiĝas en unu el la eksteraj distriktoj de Ĉikago, en unu el la plej mizeraj "slums" (loĝejoj) de la ĉirkaŭaĵo. La loĝantaro konsistis el negroj, italoj, hebreoj kaj aliaj enmigrintoj. Ĉiu domo estas loĝata de aparta nacia grupo. Mia domo estas hebrea. Ĉiuj loĝantoj de la strato miksas sian gepatran lingvon kun aŭditaj vortoj el aliaj lingvoj kaj kreas tiel strangan lingvaĉon. La komerca lingvo plej ofte estas angla, sed el iu aparta speco. Ĉe la stratanguloj estas mizeraj malgrandaj butikoj, fiŝ-, viand- kaj legomvendejoj, kiu eligas strangajn odoraĉojn. Laborejoj troviĝas en kelaj ejoj, en kiuj malriĉaj metiistoj riparas ŝuojn, gladas vestaĵojn aŭ kolorigas malnovajn ĉapelojn.

La domoj estas en la tuta urbparto en mizera stato. Preskaŭ ĉiuj estas el ligno. La trotuaroj havas grandajn fendojn, kiuj endanĝerigas la vivon dum la irado. Dumnokte viviĝas la stratojn egaj ratoj, kiuj ĉe la duonlumo de kelkaj ete lumantaj lanternoj traserĉas la stratkanaletojn aŭ banas en la lagetaĉoj, kiuj postrestis de la lasta pluvo. Ĉiu domo havas lignajn malantaŭajn ŝtuparojn, kiuj kondukas de la tero al la tegmento kaj ebligas 50-metran ĉirkaŭrigardon. De unu domo al la alia tiriĝas ŝnuroj, sur kiuj kelkfoje pendas subpantalonoj aŭ ŝtrumpoj. Malnovaj lavujoj kaj potoj, en kiuj estas plantitaj bulboj aŭ ia herbo, anstataŭas por la loĝantoj la grundon. Ne estas eble longe restadi sur tiuj malantaŭaj ŝtuparoj, regas tie ia odoraĉo kiu havas egan similecon kun tiu en la katakomboj.

Trovi laboron, ne estis fine malfacile. Ĉe la unua firmo, kie mi demandis, mi tuj ricevis laboron, kiel forĝisto. Antaŭ ol mi demandis mi ricevis instrukciojn de la partikamaradoj kiel konduti sin. Unue oni devas fari sian plej stultan mienon, ŝajnigi malmultan scion de la angla lingvo. Pri politiko oni devas kompreni eĉ ne ereton, sed esti fakulo en tiu laboro por kiu oni momente bezonas laborfortojn. Estas dezirataj laboristoj, kiuj pro nekono de Usonaj kondiĉoj toleras ĉian malbonon.

La burokratismo floregas. Unue oni devas demandi la pordiston pri pasporto. Kun tiu (se oni ĝin ricevis, la pordisto estas la unua dunga kompetentulo) oni iras al la kontoro. Tie staras homo, kiu aspektas kiel boksisto, kaj akceptas la laboristojn, kondukas la aspiranton al iu skribisto, kiu scias kelkajn lingvojn (kiel? estas alia demando) kaj esploregas la laboristojn ĉu ili havas la postulitajn virtojn (vidu supren). Poste oni devas iri al kuracisto, kiu esploras la aspiranton kiel ĉevalon pri forto kaj saneco, pezas kaj mezuras lin. La menciita boksisto forkondukas tiun, kiu ĉi esploron sukcese travivis al la laborejo, registras lin, donas numeron kaj fine la procedo finiĝis.

La procedo por fariĝi laboristo ĉe la "Me Carmick-International Harvester Company" daŭris kvin horojn.

Venontan tagon je la 6-a kaj 30 mi komencis la laboron. Ni laboras 9 horojn potage, sabate oni estas devigata labori kromajn horojn, tiel ni laboras entute 56 horojn posemajne. Mi perlaboras ĉiutage 5 dolarojn. La helplaboristoj, negroj aŭ meksikanoj, kiuj laŭ la opinio de la usonaj kapitalistoj estas ne plenvaloraj homoj, ricevas pohore 42 cendojn. Mi estas kutimata pezlaboron de la Ruhra regiono, sed ĉi laboro estas multe pli streĉiga. Nia fabriko estas "open shap", t. e. unu el la multaj laborejoj havantaj neorganizitajn laboristojn. La usonaj sindikatoj estas puraj faklaboristaj unuiĝoj, kiuj preskaŭ timeme evitas la enmigrintojn.

Ni estas kvinmil laboristoj. La instalaĵo de la fabriko similas la Germanian. La laboristoj certe estas pli ekspluatataj ol ĉe ni. Ĉia laboro akordlaboro. La prezoj nature estas tiel malaltaj, ke oni devas penegi por atingi sufiĉan tagsalajron. Mi prilaboras malgrandajn ferpecojn. Hieraŭ 3.500. Ĉiu peco estas prenata en la manon, kelkfoje turnata, en la maŝinon metata, poste la pezan levilon oni devas tiri, elpreni la pecon, ĵeti ĝin al la amaso kaj samtempe nombri ĝin. Por ĉiu cento oni ricevas 9 cendojn. Tiu nombrado estas la plej terura afero. Dum naŭ horoj la pensoj nur estas direktataj al ĉi mizera laboro kaj al la ĝusta nombrado de la naŭ cendoj.

Trad. el "Sächsische Arbeiterzeitung" (Saksia Laborista Gazeto), M. Sch.



EN PUNDOMO

Antaŭ kelkaj tagoj mi legis en burĝa gazeto grandan artikolon pri la vivo de la malliberuloj en pundomo de Waldheim en Saksio. Tiu raportanto tre rozkolore ilustris la restadon en tiu domego, tiel ke oni povus kredi, ke la vivo de tiuj pundomanoj estas sufiĉe bona. Eĉ esperanton oni instruas al la malliberuloj. Povas esti, ke la pundomoj en Saksio iomete diferencas de la bavaraj.

En Straubing (Bavario) estas ankaŭ tia pundomo en kiu restadas nia k-do Streidl (7134). Li estas unu el la 7 sovet-respublikanoj en Bavario. Por pli faciligi la restadon al k-do Streidl, lia kuzo abonis por li "S.R.", kiun ni regule sendis al li. Antaŭnelonge, kiam ni sendis nian kongresprotokolon al li, ni ricevis poŝtkarton kun jena enhavo:

"Por ke vi evitu nebezonajn elspezojn, ni sciigas al vi, ke estonte ni ne plu enmanigas esperantaĵojn al la malliberulo Streidl".

Altestime
Direkcio de la pundomo Straubing.
Nomo nelegebla.

LETERO EL ITALIO

La aktiveco de la italia Proletaro

Jam kelkaj semajnoj antaŭ la atenco en Bologna, sentiĝis la pli grandigita premo kontraŭ la Laboristaro.

Okaze de la britia minista striko kaj por helpi al la agrikulturistoj de Mollinella[1]) aranĝis la italaj laboristoj per la ĵurnalo "Unita" grandegan manifestadon. Ĉiutage plenigis longaj listoj je mondonacoj por ĉi du celoj la paĝojn de "Unita". Ĉi publikigado de kolektlistoj havis kvazaŭ la karakteron de voĉdonado kontraŭ la faŝismo. Oni ja devas kompreni, ke laŭ la nuna en Italio ekzistanta situacio, ĉiu ajn elmontrado de aktiva laborista agado signifas tre rimarkindan kontraŭfaŝistan manifestadon. La faŝista registaro tro malfrue ekkonis la gravecon de ĉi agado kaj nur poste malpermesis ĝin.

Miloj da politikaj malliberuloj

Je la memoro de la kvara datreveno de la faŝista marŝo al Roma okazis grandnombraj arestoj de laboristoj. En Milano arestiĝis 2000, en Bologna 2000, en Roma 500, en Trieste 300 ktp. En la tuta Italio almenaŭ okazis 10 000 novaj arestoj. Tiele festis la faŝismo sian "gloran tagon".

Kiel estas la faŝistaj manifestadoj organizitaj?

Kiu ne vivas en Italio, tiu nur malbone komprenas kiel oni preparas la grandajn faŝistajn ceremoniojn. Oni ne forgesu, ke la organiziĝo en la faŝistaj sindikatoj estas laŭleĝe deviga. La kotizojn por la faŝista sindikata organizo kolektas agentoj de la fisko.

Okaze de aranĝo de manifestado kaj se estas necese koncentrigi la faŝistajn batalfortojn, la gvidantoj de la faŝista partio alvokas partopreni la membrojn sindikatajn laŭ la membrolistoj kaj ĉiun laŭnome. La alvokitoj al la partopreno estas ĉu memvole ĉu devige envagonigitaj kaj tranportataj al la provinca ĉefurbo, kie estas la kolektiĝloko. Tiamaniere estas tre facile kunigi kelkajn milojn, sed el kiuj la plejmulto idee ne konsentas kun la faŝismo. Tio montriĝas per tio, ke en ĉiuj provincoj estas la karceroj plenaj de homoj forkurintaj de la "grandiozaj" manifestadoj.

En Bologna Mussolini inspektis siajn nigrĉemizulojn. Sed vespere juna "antaŭgvardiano" pafis revolvere al la "Duce".

Furiozegis la faŝistoj. Tio estas facile komprenebla: ili bone konscias, ke la fino de la reĝimo signifus ankaŭ la finon de ilia propra vivo. Ĉiu el ili ja ligis sian propran vivon al la faŝista reĝimo per longa ĉeno de fimortigoj kaj kruelaĵoj. Kun ĉi plej simpla sento kunmiksiĝas natura krimemo kaj personaj interesoj.

Dum la samaj tagoj okazis miloj da memorfestoj, nature kaŝe, pri la Sovetia Revolucio. Tio incitis la faŝistojn, kiuj certigis, ke depost 1922 ne plu ekzistas en Italio bolŝevismo.

La interna krizo de la faŝismo

Kiel povis okazi, ke juna faŝisto atencis kontraŭ Mussolini? Tio fariĝas komprenebla, se oni atente observas la nunan italian situacion. Ĝi estas situacio paradoksa. Ĉiuj problemoj de la kapitalista stabiligo estis per la faŝismo portataj al la plej ekstremaj konsekvencoj.



Mussolini

La sindikata, urba, politika kaj armea koncentrigoj donas la maksimuman eblecon kontroli la ekonomiajn fortojn kaj defendi la kapitalismon. La revalorigo de la mono per la koncentrigo, limigo de la kreditoj, haltigo de noveldono de papermono, deviga stabiligo de 6 miliardoj da ordinaraj kaj 6 miliardoj da kvin- kaj sepjaraj ŝtataj asignoj donis fortegan frapon al la eksportindustrio kaj ĝenerale al ĉiuj industrioj, kiuj bezonas krediton. Se la senvaloriĝo de la liro forte domaĝis al la mezaj klasoj, ĝia revaloriĝo ne ŝanĝis senteble ilian situacion. La varprezoj neniel plimalaltiĝis.

La paradoksa situacio do konsistas en la jeno: *La faŝismo portas en si mem la klasbatalon, kiun li volas subpremi.* Ĉiuj perfortagoj, kiujn ĝi aplikas por malebligi la klaskontrastojn, ne havas alian valoron ol prokrasti la konflikton.

Mussolini inter du kontraŭaj fortoj

Kiel respondis Mussolini al la antagonismoj, ĉeestantaj interne de la faŝista partio kaj kiuj sin montras tute libere inter kelkaj rondoj etburĝaj, kiuj postulas por la unua faŝista programo, kaj la partigvidado, kiu agas laŭ la intereso de la financaj kaj agrikulturaj kapitalistoj?

Per la reformo de la statuto, de nun la partio fariĝis vera soldata organizo. La estroj estas nomitaj de la plej supra instanco kaj la kunvenoj okazas nur unufoje pojare. Ĉia diskuto estas malebligata, kaj sekve de tio ĉia demokratio nuligata. La opozicioj povas nur: aŭ obei la disciplinon, aŭ foriri. Sed kio estas la disciplino? Ĝi estas la blinda obeo al la "Duce". Estas vere, ke la opozicioj ne tute kontentigas la dezirojn de la etburĝaro. La faŝista ekstremismo ne tute defendas la interesojn de vastaj rondoj etburĝaj, kies esprimo ĝi estas. Sed almenaŭ ĝi ŝajnigas esti la elpurigisto de la faŝistaj vicoj kaj pledas por la ortodoksaj, faŝistaj principoj, kiuj estas forlasitaj de la novfaŝismo kaj de Mussolini mem.

Kaŭze de tiuj cirkonstancoj leviĝis la revolvero de Zamboni. La faŝistoj deklaris, ke jam de pli ol unu jaro li ne plu apartenis al la partio. Memkompreneble, ĉar la sciigo, ke li fakte apartenis al la faŝistaj vicoj, estus povinta elĉenigi terurajn pasiojn. La faŝista unueco estas artifike restarigita. Okazis kelkaj formalaj kontentigoj por la ekstremistoj, sed fakto estas la intensa batalo kontraŭ la opozicio.

La faŝismo kondukas al milito

La faŝismo kondukas al milito. Ĉu kontraŭ Turkio pro la posedo de Smirna, de Adalia kaj de la insuloj, ĉu kontraŭ Abesinio, ĉu eble kontraŭ Francio.

La artifika revalorigo de la liro, la protektado de la militindustrio, la militemo de la diplomatio, la obstina, brua disvastigo de ŝovinismaj ideoj, ĉiuj ĉi aferoj evidentigas, ke ni estas antaŭ la eksplodo de nova milito.

La rezigno pri eksporta politiko imperialisma (kiu necesigas konkuron kun aliaj landoj kaj kiu bezonas ne tre altvaloran monon kaj larĝajn kreditojn) nur povas esti permesata, se oni samtempe evoluigas alian tendencon, nome la tendencon de akiro de novaj teritorioj, kapablaj liveri al Italio krudaĵojn kaj esti merkatoj por la nacia industrio.

Sed milita politiko bezonas la unuecon de ĉiuj konstituciaj fortoj de la lando. Nu, dum situacio de interna teroro kaj dum eĉ tre vastaj rondoj etburĝaj suferas sub la premo de la reĝimo, milito ĉiuokaze estas danĝera entrepreno, eĉ se ĝi okazus malproksime de la propraj landlimoj.

Laŭ „L'Humanité" kompiltradukis M. Sch.

[1]) Vidu "S-ulon" n-o 107.

Pri la Jubileo-Ĉeno

Kun ĝojo mi vidis kiel iom post iom realiĝas mia projekto pri la Jubileo-Ĉeno. *Sed, por ke la Jubileo-Ĉeno plilongiĝu, necesas nepre atentigi la K-dojn, ke ne sufiĉas, ke ili mem, kiel okazis ĝis nun, donacu sed ili nepre devas alvoki aliulojn. Ĉe tio ili indiku la plenan nomon kaj adreson de la alvokato. Do, povos neniu elturniĝi. Krome, nia Administranto tiam havos la eblecon, kontroli ĉu la alvokito abonas nian gazeton kaj eventuale alsendi al li la ekzempleron entenantan la koncernan alvokon. Tio eble estos rimedo por plimalgrandigi la diferencon inter la nombro de abonantoj al "S-ulo" kaj de la laboristaj esperantistoj. Samtempe mi petas pardonon, ke mi ĝis nun ne povis forĝi ĉeneron pro mia malsano je "senlaboreco". Sed ĝoje mi respondas al la k-do Eŭtrapel per 2 zlotoj kaj alvokas la k-dojn: Erwin Haschke (Breslau Kronprinzenstr. II), Izrael Lejzerowin (Lodz, Kilinskiego 30), David Ekstein (Piotrkow) kaj D-ron Leopold Dreher (Krakow, Starowiilna 37), ke ili ankaŭ kunhelpu ĉe la forĝado de nia Jubileo-Ĉeno.* J. Jurysta.

Jubileo-Ĉeno

K-do A. Soarès (Paris) 10 f. f. alvokas ge-k-dojn Renée Brochet (Sarcelles), Miralles (Saragoza) kaj Livreiro Mathias (Evora).

V. Piĉaĥĉi (Leningrad) 1 rubl. alvokas sekvi sian ekzemplon ĉiujn anojn de Leningrada Gubkom-komitato de SEU kaj Revizia-komisiono. Responde alvokon de k-do Piĉaĥĉi, k-do Teterin (Leningrad) pagas 1 rubl. kaj alvokas k-dojn M. Stuttard (Briercliffe-Burnley) kaj J. Feurer (New York). K-do L. Korzo (Byhov) responde al alvoko de vegetaranoj pagas 1 rubl. kaj alvokas ĉiujn vegetaranojn ĉiel helpi la forĝadon de la ĉeno. Jurĉenko (Harkov) 0,75 rubl.; Gek-doj Michaliĉka (Elektroperedaĉa) 2 rubl.; Grönberg (Cobalt-Ont) 1,50 dol.; Kolĉinski (Kremenĉug) 2 mk. g. alvokas E. kaj M. Izgur, S. Goldfeder, Belonog, A. Avrunin, Fredberg (Kremenĉug) Muravkin (Berlin), Spiridoviĉ (Harkov), Barreira (Loanda), Hubricht (Leipzig), Rublev (Odessa), Sneiko (Minsk), Nikolskij (Smolensk) kaj ĉiujn C. K.-anojn kaj ĉiujn k-dojn el la "Informgazet-servo". „Caran d' Harre" 0,75 mk. g.; Marchevsky (Detroit) 2 dol.; Groves (Derby) 2/6 ŝil. alvokas SAT-anojn el la mezlando de Britio (ne senlaboruloj) helpi en la forĝado. Buna (Düsseldorf) 1,50 mk. g. alvokas k-don Ramon Duran (Baixas) kaj k-dinon I. Millot (Nancy). Johansson (Eksjö) 2,50 kr. sved.; Bauer (Wasquehal) 7 fr. fr.; Gottgetreu (Hannover) 0,35 mk. g.; IMITU! Je datreveno de Zamenhofa naskiĝo,*Gub. Fako de SEU (Ivanovo-Voznesensk)* donacas por ĉeno 10 rubl. kaj aĉetas 10 dol. akciojn, alvokas similajn samlandajn k. alilandajn organizaĵojn.

SAT-ano donacas *1 rublon, kaj elvokas:* Gek-dojn *P. Egorov* kaj *A. Egorova (Taŝkent), k-don N. Ŝirjaev (Blagoveŝĉensk apud Amur),* kaj la k-don el Berlin, trovinta la aferon pri la jubileo-ĉeno "burĝeca", se li ĝis nun ne donacis.

*

Imitinda Ekzemplo

Enschede'aj SAT-anoj ne povantaj varbi membrojn aŭ abonantojn por SAT, decidis por tamen iel subteni nian Asocion pagi ankaŭ por la venonta jaro la malnovajn kotizon por SAT kaj abonmonon por "S-ulo" kaj Sennacieca Revuo. *Ĉi tio donas al SAT profiton de 12 guldenoj.* Ni instigas ĉiujn SAT-anojn fari la samon.

ĈE LA DIKREDANTOJ

Atakemo de la hebrea klerikalismo

La plej fanatikaj kaj atakemaj el ĉiuj teraj di-perantoj sendube estas la hebreaj rabenoj. Kiam aperis la reakcio en Polio la hebreaj klerikaluloj levis la kapojn, komencis sin organizi kaj fondis rabenunuiĝon sub la nomo "Agudat Orabonim" por kun unuigitaj fortoj ataki la mondruman (?) parton de la juda popolo, ĝian kulturon kaj popollernejojn.

La unuan tempon la rabenoj sintenis modeste. Ili diris, ke la ĉefa tasko de la organizo estas zorgi por iliaj "profesiaj" interesoj, kaj ke ĝi ne partoprenu la politikan aŭ publikan vivojn.

Sed post kelka tempo la apetito elkreskis kaj superas jam hodiaŭ tiun de la samprofesiaj katolikaj kolegoj. La rabenoj komencis ataki ĉiaspecajn publikajn kulturejojn, precipe laboristajn. Popolbibliotekoj kaj lernejoj starigitaj per la propraj fortoj de la juda Laboristaro estas precipe en malgrandaj urbetoj la solaj disvastigiloj de kulturo kaj klereco. Ili arigas la junularon ĉirkaŭ sin kaj fariĝas tiel komuna bazo por kontraŭreligia agado. Kompreneble la ortodoksuloj tion tre malamas.

Vidante, ke iliaj fiparoladoj kaj anatemoj ne malhelpas la kreskon de libera penso inter la junularo, sed male ĝin pli entuziasmigas, la rabenoj komencis praktiki inkviziciajn batalmetodojn, nome forbruligi la bibliotekojn, bati ktp.

Jen el unu, jen el alia loko alvenis sciigoj, ke la rabenaĉoj forbruligis, denuncis librejojn kaj lernejojn kiel "komunistajn ĉelojn" kaj centrojn de "kontraŭŝtata agado". Plezure la polico plenumas la dezirojn de la piaj "aŭtoritatuloj" kaj fermas la kulturejojn unu post la alia kaj arestas ties gvidantojn.

Abundas pruvoj por la ĉi supre dirita. Mi nur citas la jenon, ĉerpitan el "Folkscajtung" n-o 146: "En la urbeto Radun, apud Wilna, troviĝis granda juda biblioteko, kiun la tiea junularo per multjara laboro kreis. Ĝi havis 1800 librojn diverslingvajn. Por la junularo de la urbeto kaj ĝenerale por la progresema parto ĝi estis la sola fonto de scio kaj klereco.

Antaŭ kelka tempo junaj ortodoksuloj nokte ŝteleniris la bibliotekon, disrompis la serurojn kaj forportis ĉiujn librojn en preĝejon. Tie la bandaĉo forbruligis ilin aŭ ĵetis en la necesejojn".

Pli kaj pli larĝigas la rabenoj sian potencon. Ili eĉ havas reprezentantojn en la pola parlamento, kiuj kune kun la judaj naciistoj perfidas la interesojn de la juda popolo.

Bedaŭrinde la liberpensula movado en Polio estas nur tre malgranda. Ĉe la 4-a kongreso de la Polia Liberpensula Asocio ĉeestis 30 delegitoj el 5 filioj. La membraro nombras ekzemple en Lodz 700, en Warszawa 500. Sed lastatempe okazis gravaj ŝanĝoj, ekzemple la aliĝo al la Viena Liperpensula Internacio. La Asocio espereble de nun montros pli klaran proletan karakteron.

Max Ŝpetrik (5323)

Rom-eklezia aroganteco

Dum la pasintaj du semajnoj okazis en München en diversaj preĝejoj eklezia atako al la endanĝeriĝintaj animoj de la gekredemularo, t. n. "interna misio". Dum la porvirina prediko pastraĉo diris: „Ĉiu edzino havante nur unu infanon estas publikulino, ĉar ŝi certe povus naski pli da infanoj". — Dum la porvira prediko alia direprezentanto diris: "Se vi sekskuniĝas kun viaj edzinoj, kuŝigu ilin sur la dorso, ĉar tio garantias la gravediĝon". — — Kaj neniu el la gekredemularo donas al la kanajlaro roma per la eksiĝo el la eklezio la unusolan respondon. Kion pli admiri: ĉu la impertinentecon de la pastroj aŭ la stultecon de la kredemuloj?

SAT-ano *Milok Centdek.*

★

ANGLIAJ LABORISTAJ KANTISTOJ EN GERMANIO

La longa daŭro de la striko kaŭzis al la heroaj ministoj grandan mizeron. La helpo veninta el eksterlando estis nesufiĉa, pro tio oni serĉis rimedojn por instigi al la subtenado. Antaŭe venis parolantoj por sciigi al la eksterlandaj laboristoj la staton de la batalantoj. Sed oni spertis, ke parolado farita en lingvo nekomprenebla por la aŭdantaro, ne estis bona rimedo por ĝin entuziasmigi. Do oni provas aliigi ĉi malagrablaĵon, sendante laboristajn kantistojn. La rezulto certe estis pli kontentiga ol tiu de la aranĝitaj paroladoj.

De la 4-a de septembro ĝis la 8-a de novembro gastis en Okcidentgermanio angla laborista virĥoro. Post ĉi naŭsemajna restado ĝi sukcesis hejmenporti 13 000 g.mk. Kelkaj tagoj pli poste venis dua virĥoro el Anglio kiu vizitis Mezgermanion kaj gastis ankaŭ en Halle. Dum la tiea bone vizitata kunveno parolis, inter aliaj, sindikata sekretario, kiu esprimis sian bedaŭron, ke la laboristoj ne povas interkompreniĝi kun la kantistoj. Post la prezentado de la kantoj, kiuj estis entuziasme aŭskultitaj, la tradukisto tradukis la salutojn kaj raportojn al la britiaj K-doj. La ĉeestantoj nur povis, observante la mienojn, diveni ilian konsenton. Post komuna kantado de la "Internacio" finiĝis la kunveno.

Denove montriĝis la urĝa bezono de internacia lingvo. Sed la sekretarioj kaj funkciuloj de la grandaj laboristaj organizoj kontentiĝas esprimi sian bedaŭron pri la neebleco de interkompreniĝo inter la diverslandaj laboristoj. Tio estas des pli bedaŭrinda, ĉar ili ja bone konas la rimedon por la forigo de tia malhelpaĵo. Sed malgraŭ tio, ili mem ne lernas kaj ne rekomendas la lernadon de esperanto. Sed ankaŭ ni devas pli atenti tiajn okazojn, kiuj al ni ebligas montri la praktikan valoron de nia lingvo. Estonte la K-doj klopodu partoprenigi esperantiston je tiaj laboristaj delegitaroj. Tiel ni plej bone konvinkos la laboristojn pri la utileco de esperanto.

SAT-ano *(7046.)*

TRA LA SCIENCO

LA ANALIZA LAMPO

Antaŭ nelonge oni enkondukis por ĝenerala uzado analizan lampon, per kiu oni povas tuje diferenci falsigaĵojn, falsan monon, falsan teksaĵon kaj legi per kemiaj procedoj forigitajn skribojn aŭ diferenci unuan ĝustan tekston de falsiga. La principo de la metodo estas jena: oni uzas hidrargan lampon (la elektrodoj estas ne kiel ĉe lumarkaj lampoj el karbo, sed el hidrargo) kiu precipe disradiadas ultraviolan lumon. La lasta havas la specifan econ relumetigi kristalojn aŭ diversajn kemiaĵojn en tute difinita kolora nuanco. Do, posedante la originalaĵojn (monon, ŝtofon ktp.) kaj konante ĝian nuancon, oni senpene povas per komparo pruvi la falsigon de iu aĵo. La hidrarga lampo pro ĉi nova aplikado fariĝas universala aparato.

FLUIDA LUMO

Tiel oni nomas solvatan radioaktivan substancon kiu lastatempe estis sukcese aplikata en la medicino kontraŭ la kancero. Pri tio raportis antaŭnelonge en kunsido de Berlina medicina societo Prof. Lazarus. Jam sufiĉe longe oni konas pri la kuracaj efikoj de Roentgen-radioj sur histaron kaj haŭton. Nome la malsanaj histaroj estis per ili detruataj. Ankaŭ la kanceron oni kuracis per traradiado el Roentgenaj tuboj. La nova metodo estas la eluzo de la fakto, ke ĉiu radioaktiva substanco daŭre disradias tri specojn de radioj el kiu *unu respondas* al la Roentgenaj. Solvaĵo de tia substanco estas enigata en la malsana loko, tiel ke la radioj de ĉiuj flankoj kaj plej interne povas efiki. Krom tio donis bonajn rezultojn por la sangcirkulado la ŝmiro de la haŭto per la substanco. *H. Muravkin.*

KONSTRUADO DE VOLGA-DON KANALO

Jam en la jaro 1918 Lenin proponis pridiskuti la demandon de la kunligo perkanala de Volga kaj Don. La kunsido de la regna komisio por plana mastrumado la 14-an de majo 1918 asignis la necesan monsumon por komenci la konstrulaboron. Sed la civila milito malhelpis la efektivigadon.

En la lasta tempo la Konsilantaro de Popolaj Komisaroj denove pritraktis la problemon kaj decidis, ke pro la grava ekonomia signifo kaj teknika efektivigebleco, la laboro estu ree komencata. La akvaj arterioj Volga, Don kaj Azova maro kunligas la Baltikan kun la Nigra maro kaj Maria akva sistemo. La politika kaj ekonomia signifo de ĉi plano estas grandega. Rezultiĝos ankaŭ plimalaltiĝo de la transportkostoj. Sed precipe la problemo estas grava pro la nuntempe en Germanio okazanta konstruado de akva vojo Rhein-Main-Danubo. Rigardo al la landkarto instruas, ke la konstruado de ĉi du kanaloj ebligas senperan varinterŝanĝon inter Sovetiaj regionoj kaj Okcidenta kaj Centra Eŭropo. Plej grave estas, ke ĉi interŝanĝoj povos okazi neĝenate de la politikaj cirkonstancoj rilataj al Mediteranea Maro.

La geografiaj kondiĉoj de la akvodividilo inter Volga kaj Don ĉe la loko de la plej granda proksimiĝo ilia (ĉe la urboj Stalingrad kaj Kalaĉo) estas pli favoraj ol tiuj ĉe la Rhein-Danuba akvodividilo.

La Volga-Don kanalo, kiu havos longecon je 104 kilometroj, altiĝas super Volga je 72 metroj kaj super Don je 30 metroj. Dume la akvodivida punkto de la Rhein-Main-Danubo kanalo estas 68 metroj super Danubo kaj 176 metroj super Main. Sekve necesas, ĉe la lasta, konstruado de multnombraj kluzoj kaj digoj. Kelkaj kluzoj kaj digoj jam estas konstruitaj.

La Volga-Don-Azova maro akva sistemo pligrandigas ega la ŝipireblan akvaron de Sovetio. Ĉi akvaj vojoj kontentigas la plej grandajn postulojn, ĉar ili eĉ taŭgas por la transportado de grandegaj, pezegaj ŝarĝoj. Proksimume ili ebligas la transportadon de 17 milionoj da tunoj pojare. La konstruado de ĉi kanalo kostos 35 milionoj da dolaroj. Sed tamen ĝi estas tre profitdona entrepreno. Per ĝi ebliĝos la utiligo de la grandega valoro, kiun prezentas la Kaspia maro kaj la Volga kun ĝiaj riverbranĉoj. Per la konstruado de ĉi 104-kilometra kanalo Sovetio ricevos uzeblajn akvovojojn, kiuj ampleksas multajn milojn da kilometroj. Pro tio la konstruado de ĉi kanalo estas pli preferinda ol la konstruado, de fervojo, kuniganta Nigran kaj Azovan Marojn kun Volga.

Elrusigis (5407).



Inter niaj kontraŭuloj

(Daŭrigo[1])

Se la ido-movado ankoraŭ ne mortis, do samtempe ĝi eĉ ne montris iun superkreskon rilate al esperanto, kaj "havas nuntempe en siaj vicoj plej aktivan ribelon kaj konfuzon".[2]) Kiel ĉiu kreaĵo oportunisma, Ido iom post iom, pro ĉesigo de subvencioj malavaraj, per kiuj povis ĝi ekzisti, nun rapide malnoviĝas, disfalas kaj proksimiĝas al morto.

La diskutetoj kaj diskutaĉoj pri "butero" aŭ "butro", "ĉevalo" aŭ "kavalo", eĉ pri akuzativo kaj pri la supersignitaj literoj, — havas tre malmultan socian valoron. Do, ĉie kie esperanto estas aplikata kaj Ido-teorio laŭdata, — Ido ricevas kaj povas ricevi nur malvenkon.

Sed se Ido havas nenian ideologion por kontraŭmeti al esperanto, — oni ne povas tion diri pri aliaj mondlingvistoj — ne esperantistoj. Tre klare esprimas sian rilaton al esperanto kaj siajn sociologiajn tendencojn, alia lingvo-sistemo — "Occidental".

La aŭtoro de tiu lingvo, von Wahl, tre meritoplena laboranto sur la kampo mondlingva, — iama esperantisto, ankoraŭ en la jaro 1922[3]) skribis: "Estas klare por mi: aŭ venkos bolŝevismo kaj nova kulturo de esperanto, aŭ bolŝevismo ne venkos, kaj tiam triumfos lingvoj naturaj, pli komplikaj, konservantaj la elementojn de 2000-jara eŭropa kulturo".

Estas ne grave, ke von Wahl parolas rekte pri bolŝevismo, kies instrumento, laŭ lia opinio, fariĝas esperanto. Verŝajne tio okazas nur pro proksimeco de lia loĝloko (Tallinn, Estonio) al la ruĝa Sovetio. Nin plej multe kontentigas la fakto, ke simpla demokratia esperanto, vaste uzata de la Laboristaro, estas por von Wahl simbolo de revolucio kaj de venko laboristara.

Komplikaj kaj aristokratiaj nov-latinaj kaj nov-romanaj projektoj (inter ili ankaŭ Ido) restas do simbolo de la jugo kaj subpremo por laboristoj, restas simbolo de la imperialista mastrumado, simbolo de novaj militoj kaj de sendanĝera kapitalisma ekzistado.

Kiam von Wahl skribis tiujn vortojn, lia "Occidental" apenaŭ naskiĝis. De post tiu tempo ĝi trovis varmajn partianojn ĝuste inter la idistaro. Multaj kulpigoj kaj riproĉoj estis direktitaj de la idista gazetaro al tiuj renegatoj de la idismo, sed sendube la personoj lasintaj idon kaj aliĝintaj al occidental — bone sciis kion ili faris. Ĉiuokaze, ilia "klaskonscia" argumentado estas neriproĉebla.

Jen kion skribas unu el tiuj eks-idistoj J. Prorok[4]).

"... Ni vidis en historio faktojn, kiam la nekulturaj amasoj estis uzataj kiel murrompantoj ... Pro tio oni nun disvastigas esperanton en la rondoj de komunistemaj laboristoj. Ili sendube prezentas plej grandan nombron... Se la mondo ŝanĝos sian aspekton per ruinigo de la nuna kulturo kaj enkonduko de nova komunista sociordo kun diktaturo de la proletaro, — tiam sendube esperanto triumfos"...

Kaj poste s-ro Prorok klarigas: "Ne preferas solvon donatan ne de nekulturaj fanatikaj klasoj, sed kontraŭe de la plej klarvidaj, senpartiaj personoj: sciencistoj, politikistoj, industriistoj, teknikistoj, artistoj ktp." — Bona estas tiu klarigo — "la senpartiaj industriistoj kaj politikistoj" de la burĝa landaro.

Ni povus ankoraŭ multon ĉerpi el tiu artikolo de s-ro Prorok, sed sufiĉos lasta cito: "Lukto inter occidental kaj esperanto — estas lukto inter konservo de l' kulturo kaj barbarigo, inter Paneŭropa ideo (de grafo Condenhofe-Kalergi. E. D.) kaj komunista internacio, inter individualismo socia kaj la diktaturo de l' Proletaro ... Estus batalo ne pri gramatikaj diferencoj, estas batalo inter du vivkonceptoj."

Ĉio estas klara. Do, ĉiu kontraŭulo de la laborista movado kontraŭstaru esperanton kaj subtenu pli malsimplan, malpli demokratian, pli kulturan occidental-on.

Ni estu dankaj al la firmaj paroloj de s-ro J. Prorok. Lian admonon ni intencas bone memori. El tiuj paroloj ni klare vidas la klaskonscion de niaj kontraŭuloj. *E. Drezen.*

(Daŭrigota).

[1]) Vidu la n-on 116 de "S-ulo".

[2]) Revueto de la lingvo "Medial"-"Unione" - 1926 j., n-o 4, pĝ. 40.

[3]) Revueto "Kosmoglott" - 1922 j., n-o 3, pĝ. 2.

[4]) "Kosmoglott" - 1926 j., n-o 4, pĝ. 26—27.

ŜTATO KAJ REVOLUCIO
DE N. LENIN

estas verko, kiun ĉiu revoluciano devas nepre havi en sia biblioteko

—

150 paĝoj, formato 12×18
Prezo: 1 mk. g.

Mendu tuj ĉe la Administracio de SAT
Colmstr. 1, III, Leipzig O 27

TRA ESPERANTIO

Ĉe la laboruloj.

K-DO NATHANS PRI ESPERANTO

Sufiĉe da famuloj laŭdis esperanton kaj rekomendis ties lernadon, sed mem ili ne lernis. Pro tio la laŭdoj laj rekomendoj perdis multe de sia efiko. Tial la rekomendoj de la sekretario de *Internacia Transportista Federacio* estas multe pli valoraj kaj konigindaj.

En la novembra n-o de la Bulteno de tiu organizo, k-do Nathans, en *gvidartikolo* rilate al la antaŭnelonge okazinta internacia kongreso de I. T. F., skribis interalie:

"Malgraŭ grandnombraj fakaj konferencoj, estis tamen malkontentuloj, kiuj deziris ankoraŭ pli multe da subfakaj aranĝoj. Ni celas al tio, sed oni devas atenti pri la grandegaj malfacilaĵoj, kiujn ni devas venki: por ĉiu konferenco, kia ajn malgranda ĝi estas, ni bezonas kelkajn spertajn interpretistojn. La anoj ja povas faciligi nian taskon, ĉu lernante tri aŭ kvar pliajn lingvojn, ĉu obeante la rekomendon de la Ĝenerala Konsilantaro pri la lernado de la helpa lingvo esperanto, kio estos al ili multe pli facila . . ."

*

NEKROLOGO

Mortis la 6-an de decembro en Amsterdamo

K-do **W. Nutters**

Li estis unu el la pioniroj de la lab-esp-movado en Nederlando kaj konata figuro en la antaŭmilita socialista esp-movado. Li redaktis kaj eldonis Internacia-n Socia-n Revuo-n, la unuan socialistan esp-organon. Li tradukis i. a. "La mizeruloj-n" de Victor Hugo, kies unuan volumon kaj aliajn socialistajn broŝurojn li ankaŭ eldonis.

Post la milito li ne plu aktive partoprenis en la lab-esp-movado. Sed tamen li laŭpove helpis, defendante esp-on, kiam tiurilata propono troviĝis sur la tagordo de kongreso de kompartio, enpresigante kurson esp-an en la komunista gazeto "De Tribune", kies redaktoro li estis.

Nun li estas for. K-do, ni daŭrigos vian laboron. (670)

*

REFUTU KALUMNIOJN

Lastatempe aperis kelkfoje en britiaj ĵurnaloj, artikoloj rakontantaj la plej terurajn aferojn pri Sovetio kaj sovetiaj eminentuloj, mortintaj aŭ vivantaj. Eble la sovetajn k-dojn interesas ĵurnaloj, kiuj raportas kalumnie pri ilia Ŝtato. Mi faras al ili proponon pri starigo de jena rubriko en iliaj ĵurnaloj: "Kion oni rakontas eksterlande pri Sovetio". La materialon por tiu rubriko liveru la lab. esperantistoj. Krome ni posedas per nia lingvo la eblecon havigi aŭtentikajn informojn, kiuj respondus al la publikigitaj kalumnioj. Estus la tasko de la k-doj zorgi por la represo de ĉi respondoj. Kiu deziras havi tradukon de artikoloj presitaj en britiaj gazetoj skribu al: k-do *C. Fielding,* 53 Diana Street, Cardiff, Britio.

NIA POŜTO

Hjulo. — Ni volonte publikigus vian alvokon pri fondo de *Virina Sekcio* en SAT sed ni estas konvinkitaj, ke tia entrepreno nun estas antaŭtempa, tute ne vivkapabla. La SAT-aninoj eĉ ne kapablas provizi per artikoloj la rubrikon *Feminismo* en "S-ulo". En SAT estas multaj proponantoj, projektantoj, sed malmultaj plenumantoj.

(5219) — Loko mankas al ni por publikigi vian proteston. La moto: *For la neŭtralismon!* ja restas ĉiam aktuala, ĉar lab. esp-istoj legas, abonas kaj eĉ kunlaboras al neŭtralaj gazetoj. Ŝajnas, ke ĉe kelkiuj la klaskonscio tuj malaperas, kiam ili transiris la sojlon de Esperantio.

A. B. B. — Viaj konsideroj ŝajnas al ni ĝustaj, sed ni ne povas tro ofte publikigi samspecajn artikolojn kiel tiujn, kiujn vi ŝatas, tial ke aliaj legantoj ĝuste riproĉis pro la publikigo de tiuj samaj artikoloj. — Pri N. E. P. ni ne povas doni al vi konsilon; ni simple menciis ĉi novan gazeteton kiel ni kutimas fari pri ĉiu nova eldonaĵo. *Red.*

LASTHORE

La VII^a SAT-Kongreso okazos en Lyon. En la proksima n-o ni publikigos la unuan komunikon.

LA FRANCIA POŜTO FUŜAS

Laŭ nia peto (vidu en la n-o 106) kelkaj k-doj sendis al ni banderolojn sur stampitajn de la poŝto. Ni povis konstati, laŭ la stampo de la deira poŝtoficejo, ke kulpis pri la malfruiĝo ne la ekspedservo, sed la poŝto mem. Ni faris la kutimajn plendojn ĉe la koncerna poŝta instanco. Cetere nia plendo ne plu utilas nun, ĉar denove la gazeto estas presata kaj ekspedata el Leipzig.

Sed oni bone notu en la memoron, ke la Redaktejo restas en Paris.

Ekzekutivo de SAT.

*

KIU PRETAS HELPI

Laŭ proponoj de kelkaj k-doj, ni planas meti en la Jarlibron por 1927 resumon pri la gravaj sukcesoj, kiujn esperanto akiris dum la lasta jaro. Sed tempo mankas al ni por kompili la materialon, kiu estas disŝutita tra la paĝoj de "Sennaciulo". Kiu pretas preni sur sin tiun taskon, tiu informu senprokraste la Ekzekutivan Komitaton de SAT, 23, rue Boyer, *Paris* (XXe).

*

"ONI MALLAUDAS"

K-do José Salom (Palma de Mallorca, Hispanio) presigis en *Sennaciulo* anoncon, ke li volas korespondadi pri laborista vivo, komunista movado ktp. Al mia unua letero li respondis per bele ilustrita poŝtkarto, enhavanta 2—3 liniojn, per kiu li diris, ke li pro tempomanko ne povas korespondadi. En la nomo de nia tuta grupo, mi petegis lin daŭrigi la korespondadon kaj sendi kelkajn sciigojn pri Hispanio, ĉar ni havas nenian korespondanton en ĉi lando. Je tiu mia letero mi ricevis same belan poŝtkarton, per kiu k-do Salom promesis al ni esti nia korespondanto. Ni sendis trian leteron kun detala plano de korespondado. Sed al ĉi letero li sendis responde belegan poŝtkarton kun la sciigo, ke li bedaŭre devas rifuzi la pluan korespondadon, ĉar li estas treege okupata per diversaj aferoj.

Ĉar la korespondado estis komencita konsente kun k-do Salom kaj eĉ laŭ lia anonco kaj ĉar ĝi havis por niaj laboristaj rondoj kvazaŭ oficialan karakteron, kaj konsiderante, ke lia rifuzo okazis laŭ ridinda preteksto (ni ne citas la pretekston detale) kaj ke li per tio iom kompromitis nian peresperantan laboron, ni mallaŭdu k-don Salom. *P. Kirjuŝin.*

*

KRONIKO

Ĉeĥoslovakio.

Plzen. — La ĉi tiea grupo de la Lab. Esp. Ligo Ĉeĥ. festis, 20. nov., la 15 jaran jubileon de sia ekzistado. Okazis solena ĝenerala kunveno en la laborista domo "Peklo". K-do Peŝek raportis pri la dum 15 jaroj farita laboro.

Vespere okazis en "Popola scenejo" amika vespero kun ĉeĥa-esperanta programo. Oni prezentadis "Je la kongreso", ĉeĥlingvan teatraĵon priesperantan de K-do Pech, k. "Servisto prezentas estron", esperantan teatraĵeton. Ĉi festo estis bone vizitata k. plenumis la varban taskon.

Francio.

Troyes (Aube). — K-do G. Hugot-Raison gvidas kurson, vizitatan de 15 gelern.

Latvio.

Riga. — La 24. nov. la 8a regiona komitato de la socialdemokrata partio okazigis plivastigitan kunvenon por aŭskulti la raporton de k-do A. Krastin pri esp-o k. ĝia signifo por la Laboristaro. Ĉeestis 60 personoj. Post duhora parolado kaj diskutado la regiona komitato unuanime akceptis favoran rezolucion, per kiu ĝi esprimis la deziron, ke esp-o kiel sola interkomprenigilo estu ĉiel subtenata k. ke ĝi estu enkondukata en la laboristaj lernejoj. Post la debatoj fondiĝis grupeto dekkvinpersona, kiun instruos k-do Krastin laŭ "Petro".

Nia SAT-rondeto okaze de sia fondo ricevis multajn salutleterojn. Ne povante respondi al ĉiu salutinto aparte, ni esprimas nian koran dankon al ĉiuj per "S-ulo". *6837.*

Litovio.

Radviliŝkis. — La 14. XI. okazis kunveno, kiu decidis fondi esp. grupon k. prepari kursojn. Estis elektita jena estraro: Borkaŭskas prez., vic. prez. Abramaviĉius, sekr. Stasilastis k. kas. Zalgeviĉius. Nuntempe la grupo havas 20 membrojn k. preparas plurajn kursojn. *Borkauskas A.*

Sovetio.

Samara. — Nun ekzistas ĝis 24 lokaj esp. grupoj en la tuta samara gubernio, el kiuj 11 en vilaĝoj. En la rondetoj estas ĝis 300 lernantoj.

Dimanĉe la 28. XI. ni havis urbkunvenon esperantan, ĉeestis 80 esp-istoj. *5913.*

Ĉe la Neŭtraluloj.

La XIX. Universala Kongreso de Esperanto okazos en Danzig de la 28-a de julio ĝis la 4-a de aŭgusto 1927.

La XVI. Germana Esperanto-Kongreso okazos en Köln, dum Pasko 1927.

*

Ni ricevis jenan leteron, kiun ni publikigas sen ia ajn plej malgranda ŝanĝo. Tion ni faras, ne pro la minaco de s-ro K. Niŝimura, sed pro tio, ke li, kun serioza tono, parolas tiel amuze, kiel Johano Tuzik. Red.

Al la redaktanto de Sennaciulo,

Paris.

Estimata Redaktanto,

en la numero de la 2-a de tiu ĉi monato de via gazeto aperis artikolo, kiu grave atakas nian movadon. Pri la personaj opinioj de la subskribinto ni ne parolas, ĉar, kiel ajn eraraj ili estu, ĉiu rajtas havi siajn opiniojn. Sed ne estas same pri la faktoj, kiujn la verkinto citas kaj kiuj estante tute falsaj, nur atestas la ignorecon de la verkinto kaj povus erarigi la publikon, se ni lasus ilin sen refuto. Tial ni petas vin enpresigi nian respondon en vian sekvantan numeron.

"Omoto havas nenian difinitan programon" — estas falsa aserto: oni ne rajtas juĝi aferojn kiujn oni ne konas. La aŭtoro de la artikolo ne konas nian programon, kiu tamen ofte aperis en niaj gazetoj. Nia programo estas la realigo de universala teokracia regado de la homaro sub la gvidado de unu potenca spirita estro.

"Sinjoro Deguĉi suferante pro malbona digestado, fariĝis tre babilema" — du eraroj estas en tiu ĉi frazo:1! Nia spirita estro neniam laŭ nia scio suferis pro malbona digestado,2! li tute ne estas babilema, kontraŭe li ĉiam rekomendas malmultan parolon kaj multe da ago.

"Kreiĝis 7896 volumoj de la sanktaj Oomoto skribaĵoj" — falsa troigo! Nur estas eldonitaj ĝis nun 74 volumoj en japana lingvo. Entute nur ekzistas 77 volumoj en manuskripto, sed ni esperas, ke la Majstro ankoraŭ multe verkos je plej granda ĝojo de la inteligenta publiko.

"La sankta sinjoro Deguĉi parolis kontraŭ Esperanto en la ne antaŭ longe okazinta pan-Azia kongreso." Jen estas frazo, kiu celas per rekta mensogo malhonorigi nian majstron. Ni deklaras, ke sinjoro Deguĉi tute ne ĉeestis tiun ĉi Kongreson. Efektive, li ne povas forlasi la distrikton Kioto-fu, ĉar li nur estas liberigita de malliberejo kontraŭ kaŭcio kaj la registaro — kiu konsideras lin kiel *revoluciulo,* tute ne permesas, ke li faru ian ajn vojaĝon. Li neniam parolis kontraŭ Esperanto, li estas mem Esperantisto, verkis modelan japanan Esperantan vortaron, konstruigis lernejon kaj ĉielmaniere subtenas la disvastiĝon de nia lingvo en la tuta mondo kaj speciale en Oriento. Ni do protestas kontraŭ tiu ĉi frazo tute speciale!!!

"Dum la Edinburga Kongreso inter du dancoj la kongresanoj povis partopreni Oomoto Kunsidon" — estas rimarkinde, ke nia kunveno okazis samtempe kun aliaj fakaj kunvenoj kaj tute ne inter du dancoj.

"Estas nun tute klare, ke nia ĵurnalo estas redaktita en fundamenta Esperanto" — citas la mistera n-o 7050. Jen la *originala* frazo el nia numero 8—9: "Estas do nun klare, ke nia movado celas marŝi mano kun mano kun la ĝenerala Esperanta movado kaj ke nia ĵurnalo estos ĉiam redaktata en fundamenta Esperanta lingvo." Ĉiu honesta leganto konstatas, ke la n-o 7050 malhoneste aliigas la tekston por erarkonduki la legantaron. Tiu ĉi estas vera jezuita agmaniero, inda al *mezepokaj skolastikoj.*

Stagni kaj sekretariato ne estas kontraŭfundamentaj vortoj, ĉiu aŭtoro rajtas eksperimenti pri novaj esprimoj, kiujn li juĝas utila. Via propra ĵurnalo plej bone ilustras tiun ĉi aserton!

Ni atendas vian promesitan artikolon esperante, ke vi agos kun pli da honesteco kaj kun pli da objektiveco en viaj kritikoj.

Se en du sinsekvaj numeroj de via ĵurnalo ne aperos nia respondo, ni mem informos viajn membrojn pri via agadmaniero kaj ni rezervas al ni aliajn paŝojn, kiun ni juĝos utilaj.

Ni estas kun saluto,

por la Eŭropa Propagandoficejo
de Oomoto,

Koogecu Niŝimura, direktoro.

SOVETIO HELPAS AL LA NEPROGRESINTAJ POPOLOJ

La malfeliĉo de la malgrandaj popoloj konsistas en tio, ke ili mem ne povas krei sian propran kulturon. Sed klerigan laboron inter ĉi popoloj oni povis nur komenci, kiam jam estis koncerna literaturo. Por la kreado de ĉi lasta oni antaŭe devis verki por la multnombraj neprogresintaj popoloj alfabetojn. Por ĉi celo en Sovetio estas starigita propra oficejo: "Konsilantaro de naciaj malplimultoj", kaj eldonejo, kiu komencis sian laboron en la jaro 1923.

Dum 1924—25 estis eldonata de ĉi eldonejo 120 libroj kun sume 1 230 folioj. La plej granda parto el ili estis en la lingvoj de orientaj popoloj. Ĉi novaj lernolibroj vivigis la naciajn lernejojn. Mordva-oj, koreoj kaj orjatoj ricevis la unuan fojon librojn por la lernejo de la unua grado. La plej granda sukceso de la eldonejo estis la eldonado de libroj por la alfabetigo. Dum 1925—26 estis eldonataj en la tartara lingvo 400 000 abc-lernolibroj, en ĉuvaŝa lingvo 50 000 kaj en maria lingvo 60 000 ktp. Entute atingis la eldonnombro de abc-lernolibroj por la naciaj malplimultoj dum 1925—26 670 000 ekzemplerojn. Dum la lastaj tagoj estis ankaŭ transdonita al la jakuta centra librejo 300 000 libroj.

En RSFSR sen la aŭtonomiaj regionoj kaj respublikoj aperas 35 ĵurnaloj en 18 nerusaj lingvoj. En la naciaj regionoj kaj respublikoj aperas preskaŭ ĉiuj ĵurnaloj en propra nacia lingvo. Ĉar ĉi sola eldonejo ne kapablas plenumi la ĉiujare kreskantajn taskojn estas starigita dua eldonejo. Aperas gazeto "Nacia Klerigo", kiu unuigas la tutan nacian klerig-laboron.

La 20an de oktobro 1926 en la urbo "Detskoje Selo", la somera ejo de la estintaj imperiestroj, estis solene inaŭgurata "Labfako" (laborista fakultato, kiu antaŭpreparas la lernantojn por la supera lernejo) de nordorientaj popoloj. Ĉi inaŭguro finis longan laboron, komencitan en 1920 per la organizado de Mongol-Tibetaj kursoj. "Labfako" koncentrigos pli ol 40 apartajn naciojn. Inter la ĝis nun alvenintaj lernantoj jam troviĝas samojedoj, tungusoj, kalmukoj, ĉukĉoj, ostjakoj, oleutoj, ŝorcoj, mongoloj, oroĉovoj, ujguroj, lamutoj jakutoj kpt. La intereso, kiun kaŭzis la "Labfako" en la plej proksimaj anguletoj de USSR, estas neordinara. La antaŭe difinitaj cent lokoj jam ĉiuj estas okupitaj kaj ĉiam denove alvenas novaj petoj. Ĉi petoj alvenis el Turkmenistan, Kara-Kirgizistan, Pamir, Kamĉatka, Komandorinsuloj, Aleutaj insuloj ktp.

La sama intereso por "Labfako" montriĝis ekster la limoj. Registaroj de Mongolio, Tibeto kaj Tannu-Tuva respubliko speciale petis la "Labfakon", kiu laŭ ĉi petoj destinis por mongoloj 15 lokojn, por Tannu-Tuva-anoj 20 lokojn kaj tibetanoj 10 lokojn.

En la caraj palacoj, kie dum la antaŭaj jaroj okazis diboĉadoj de feŭduloj, nun kunvenas viroj kaj virinoj, kiuj post kelkaj jaroj en sia sovaĝa patrolando plivastigos scion kaj sciencon kaj metos pli ol unu ŝtonon por la konstruado de la socialismo en la malproksimaj Oriento kaj Nordo. *P. Kirjuŝin.*

✲

FAŜISTOJ PAFAS LABORISTOJN

La germanaj reakciuloj ĉiutage pli kaj pli fariĝas impertinentaj. La 2an de decembro venis al Griesheim 35 eksterurbaj nacisocialistoj (Hitleranoj) por aranĝi publikan kunvenon, malgraŭ tio, ke ili bone sciis, ke en ĉi industria urbeto ne estas varbkampo por ili. La tuta afero do ne havis alian celon ol provoki la laboristan loĝantaron kaj pro tio ili ankaŭ estis armitaj. Vizitis la kunvenon ruĝfrontanoj kaj regnastandardanoj. Senlaboruloj deziris senpage eniri la kunvenon, sed kiel respondo faŝisto per rajdvipo batis la ĉe la pordo starantajn laboristojn. Pro tio la ekscitita homamaso penetris en la salonon. Tie ĝi estis akceptata de la faŝistoj per revolverpafoj, kiuj vundis kvar laboristojn. Fine oni sukcesis, helpe de la laboristoj, aresti la faŝistojn. *(3317.)*

LA SPRITA ANGULO

Nur homoj povas ridi —
ne bestoj ...

Ĉu vi freneziĝis? En Julio vi decidis veturi al Nice? Tie ja estas nun almenaŭ 40 gradoj en ombro!

—Kaj kiu ordonas al mi promeni en ombro?

*

Kio? plialtigon de salajro vi deziras? El kiu kaŭzo?

— Mi edziĝis, Sinjor'-direktoro.

— Pardonu al mi, sed mi ne respondecas materie pro malfeliĉoj okazintaj ekstere de nia fabriko.

*

Ĉu vi scias, Moric, la tuta vivo ŝajnas al mi simila al longa, fera ponto.

— Kial?

— Ĉu mi scias?

*

— Kaj mi diras al vi, ke mi pli ŝatus esti malsana je tifo ol esti milionulo.

— ?

— Nu certe, ĉiuj milionuloj mortas, kaj el la tifo-malsanuloj nur 65%.

*

— Pipman, ĉu vi estis en Romo?

— Jes, mi estis.

— Kaj ĉu vidis la papon?

— Nature, mi vizitis lin.

— Nu, kaj kia homo li estas?

— Li estas tre agrable, sed, ŝi!.

LINGVAJ DEMANDOJ

Kiel oni devas traduki la vorton "vakvereniging" (trade-union, Gewerkschaft, Syndikat)? Oni skribas fakorganizaĵon, sindikaton kaj prof-unuiĝon. Kiu esprimo estas plej taŭga? — 670.

— La signifo de tiaj vortoj, kiuj apartenas al la speciala vortaro de la sociaj kaj juraj sciencoj, povas esti taŭge difinita (kaj eble diferencigita) *nur konvencie,* kaj pri tia konvencio estas kompetentaj nur la fakuloj, ne la lingvistoj. El la lingva vidpunkto la vortoj Fakorganizaĵo, Sindikato, Profunuiĝo, Fakunuiĝo, Metiunuiĝo estas teorie samsignifaj.

Ĉu la esprimo *presservo* estas korekta?

— La esprimo Presservo estas tute korekta, sed oni ne povas uzi ĝin kun la signifo de la franca laŭvorta korresponda esprimo: Service de presse (senpaga abono por gazetistoj), ĉar ĝi neniel povas havi tiun ĉi signifon. *Fakulo.*

RECENZEJO

De Beteekenis van mijn Herkenningsteeken of Hoe de Samenleving mogelijks eens wezen zal. Verkita de *Jan Thiery.* Formato 21×15 cm. 60 p. Havebla ĉe la aŭtoro: Rabotstraat, 16, Gent, Belgio. Prezo ne montrita.

Eszperanto Nyelvtan. Kezdö Tanfolyamok Szamara. III-a eldono. Formato 12×16½ cm. 96 p. Eldonita de Hungara Esperanto Societo Laborista, Budapest, VIII, Jozsefkörut 9, II. Prezo 1.20 Pengo.

Per la fakto, ke en la mallonga tempo jam necesis tria eldono, mem montriĝas la bona uzebleco de ĉi lernolibro eldonita de niaj laboremaj hungariaj k-doj. La aldono de ampleksa ekzercteksto kaj multnombraj demandoj al ĉiu leciono sendube tre multe pligrandigis la valoron de la libro. Krome, ĝi ankaŭ entenas trafajn skemojn por instrui la signifon de la prepozicioj, pasivaj formoj ktp. Je la fino troviĝas kelkaj legaĵoj, kantoj kaj rakontoj, parte ĉerpitaj el "Ni Legu". *M. Sch.*

MEMORNOTO

Represis el "Sennaciulo".

Arbeiterzeitung für Schlesien, Breslaŭ, 4-XII-26: "La sekreto de Siberia Tajga" (102). — *Bergische Arbeiterstimme,* Solingen, 4-XI-26: "Oni denove arestas" (108). — La sama, 20-XI-26: "El Britio" (III). — *Nijegorodskaja Komuna,* Sovetio, I-XII-26: "Homvendo en Eŭropo" (108).

Enhavas notojn pri SAT.

Der Freie Arbeiter, Berlin, 4-XII-26. — *La lutte syndicale,* Svisio, 27-XI-26. — *Accion Social Obrera,* Hispanio, 27-XI-26.

Enhavas tradukaĵojn el esperantistaj leteroj.

Bergische Arbeiterstimme, Solingen, 6-XI-26 kaj 27-XI-26. — *Der Rote Soldat,* Wien, 27-XI-26. — *Moldij Bilŝovik,* Kiev, 28-XI-26.

Enhavas priesperantajn artikolojn.

Volks-Sport, Düsseldorf, 10-XI-26. — *Arbeiterzeitung für Schlesien,* Breslaŭ, 19-X-26. — *Molodij Bilŝovik,* Kiev, 28-XI-26, 5a leciono de pergazeta esp-o kurso. — *Les Etudiants Nouveaux,* Paris, 20-XI-26.[1])

[1]) K-doj, kiu havas intereson por proleta studenta movado, skribu al ĉi redakcio leterojn por stimuli ĝin por la esp-o movado. Adr.: Les Etudiants Nouveaux, 51, rue de la Montagne-Ste-Geneviève, *Paris 5e.*

KORESPONDADO

Britio.

— Liverpool-a SAT-grupanoj, dez. koresp. pri ĉ. lab. temoj k. ĉ. l. Adr.: K-do *H. Evans,* The Lilaes, Dinas Lane, *Huyton* (Lancashire).

Ĉekoslovakio.

K-do *Jindrich Simáne* (21 j.) oficisto, Barrandova, 10, *Plzen,* dez. koresp. pri ĉ. temoj k. ĉ. l.

Estonio.

K-do *Rudolf Lepik,* Narvastr. 32, *Jöhvi,* dez. interŝ. L, PI, PM. Estas interalie gaz-korespondanto.

Francio.

Jeunesse Communiste, Bourse du Travail-7, rue du Réservoir, *Orleans* (Loiret), dez. koresp. kun grupoj prefere komunistaj el komencantoj. PK, L. Resp. garantiata.

Germanio.

— Esp. Grupo dez. koresp. pri ĉ. temoj k. ĉ. l. Resp. garantiata. Adr.: *Ewald Staub, Bertsdorf ap. Zittau* (Saksio).

K-do *Kurt Bärthel* (25 j.), Katharinenstr. 9, *Buchholz i. S.* dez. klerigan koresp-adon, L, PI, PM, resp. garantiata.

ATENTU! Kiu povas sendi propagandaĵojn por radio-esperanta ekspozico en Chemnitz? Ĉiu ricevos resp. Sendu al Adr.: *A. Bachmann,* Körnerstr. 5, aŭ *A. Müller,* Fürstenstr. 38, I, ambaŭ en *Chemnitz i. S.*

K-do *Erich Messerschmidt,* Reginenstr. 20, *Leipzig, N. 22.* dez. koresp. pri edukado, ekonomio ktp. k. ĉ. l.

K-do *Paul Zumpe,* Wohlfahrtspflege Seminar, *Gehlsdorf b. Rostock,* dez. koresp. pri ĉ. temoj, k. ĉ. l.

K-do *Paul Scho[illegible]boucher,* Ilgenstr. 2, *Stuttgart,* dez. koresp. L, PI, PM, bfl. k. ĉ. l., certe resp.

Sovet-Unio.

K-dino *Mario Grabenko,* (Instruistino) *st. Djankoj,* Juĵ. j. d., dez. koresp. k. ĉ. l.

K-do *D. Baranovskij,* Sadovo-Triumfanaja, 14, lĝ. 3, *Moskvo,* dez. koresp. kun eksterl. junaj kom-istoj.

— Ĉelo de Intern. Ruĝa Helpo (I. R. H.) ĉe Teknikumo de Ligilo, Gorohovskaja, 16, *Moskvo,* 66, dez. koresp. kun eksterl. organizaĵoj k. grupoj de I. R. H. k. Intern. Lab. Helpo. Resp. nepra.

— *Studentoj de Teknikumo de Ligilo,* Gorohovskaja, 16, *Moskvo, 66,* ĉelo de SE, dez. koresp. kun eksterl. lab. de Ligilo k. komunuloj. Resp. nepra.

K-do *Voldemar Sorokin,* stud., Gorbataja, 25, *Novoĉerkassk,* dez. koresp. k. ĉ. l. pri div. temoj. Resp. garantiata.

K-do *Nikiforov,* Mojka, 38, GET, predsedatel mestkoma, *Leningrad,* dez. koresp. pri ateistaj temoj.

K-do *V. Lubuŝkin,* stud., 21 j., hleboprom. Teknikumo, *Nahiĉevanjna/Donu,* dez. koresp. k. ĉ. l. pri ĉ. temoj, PI, PM, bfl. papermono. Resp. garantiata.

K-dinoj Anna Leontjeva, Mario kaj Anna Seĉkina dez. koresp. pri ĉ. temoj k. ĉ. l. Adr.: *Ŝostka,* Gluhov. okr. Sovetskaja ul., dom *A. Leontjevoj.*

— Mi sciigas la K-dojn, ke anstataŭ Isaako mi alprenis esperantigitan antaŭnomon *Atomo Avrunin* (1122), *Kremenĉug.*

Adresŝanĝo: K-do *Herbert Hofmann,* ĉe K-do Artemjev, Poŝtkesto 2. *Nalĉik,* Kab. Balk. obl. (antaŭe en Augsburg).

K-do *M. N. Gorjainov,* (agronomo) Ollastnaja Ŝel. Hoz Opytnaja Stancija, *Voronej,* koresp. k. ĉ. l. pri agrikulturo k. precipe pri kulturigo de div. vegetaĵoj. Ĉiam resp.

— Komsomolanoj dez. koresp. kun komsomolanoj en okcidento pri vivmaniero k. laboroj en kom.-organizaĵo. Adr.: K-dino *Julio Volkova,* Lihoslavlkaja ul. 29, *Lihoslavl* (Okt. j. d.).

K-do *Ŝevĉugov,* 7-a linio, 128, *Omsk,* serĉas fervorajn k. interes. koresp-antojn pri div. temoj, prec. pedagogia k. lab. vivo, interŝ. lernhelpilojn, mur- k. lernej-gazetojn.

— Laboristoj de Leningrada Kart-fabriko, dez. koresp. serioze kun lab-istoj ĉiul. Adr.: *Fabkom Kartfabriki,* Nevskaja Zastava, *Leningrad.*

K-do *E. Smirnov,* (fervojisto) Predteĉensk. 69, kv. 38, *Leningrad,* dez. koresp. k. ĉ. l. L, PI.

K-do *Jermakov,* Uralska, 28, kv. 6, *Samaro,* dez. koresp. pri div. temoj, L, PK, PI, k. ĉ. l., tuj resp.

Adresŝanĝo: Leningrada Gubkom de SEU estas nun ĉe K-do *Geo Teterin,* Fontanka, 21, kv. 7, *Leningrad* (antaŭe ĉe Dunajev).

Skribu al esp. kursanoj, pri ĉ. temoj, resp. nepra, sendu esp-aĵojn ktp. Adr.: Gub. ONO, Kursoj Esperanto, *Ivanovo-Voznesensk.*

— Jenaj gek-doj el *Ivanovo-Voznesensk* dez. koresp. pri ĉ. temoj k. ĉ. l.

K-do *I. V. Leontjev,* Ivanovskaja slob. s. d. Otradnoje.

K-dino *N. I. Lugovskaja,* Novo-Dmitrovskaja, 16.

K-do *A. A. Poluŝenkov,* Graĉevskaja d. Antropovih, Hutorovo.

K-dino *E. A. Samojlova,* Panskaja Obŝĉej, Gostehkont. k. Poluĉanskogo.

K-do *M. A. Studitzkij,* Sovetskaja, 24, k. 8.

K-do *N. I. Voronov,* 6-a linio, 8/2, Konstantin. poselok.

K-dino *Dlotovskaja,* Pokrovskaja ul. d. 26, *Smolensk,* dez. koresp. pri ĉ. temoj k. ĉ. l.

— Junkomunista ĉelo dez. koresp. kun gejunkomunistoj el la tuta mondo. Adr.: *P. Antonoviĉ,* Avraamievskaja, 36, *Smolensk.*

K-do *Al. Alferov,* Dalnickaja, 2, *Odessa,* (labkoro, fotoamatoro) koresp. pri foto, sporto k. lab. vivo. Interŝ. gazetojn pri foto k. sporto. Resp. garantiata.

K-do *A. Dobrovolskij,* ul. Sazonova, 5, *Gomel,* koresp. kun k-doj el Francio, Anglio, Japanio, Belgio, Aŭstrio, Hungario, Italio k. transmaraj landoj pri situacio de fervojistoj, L, PK.

Adresŝanĝo: K-do *Paŭlo Kirjuŝin,* Szkolnaja, 53, *Bobrujsk,* BSSR. (antaŭe Minsk).

Svedio.

K-do *Sinclair Söderberg,* P. L. 163, *Norrahammar,* dez. koresp. kun fake organizitaj K-doj en Sovet-Unio, kiuj laboras en fandejoj k. kun a. sovetiaj gek-doj.

ATENTU

La 2-an de februaro 1927 la Krasnodara esp-o societo organizos ekspozicion. K-doj helpu al ni montri la praktikecon de esp-o. Sendu let., poŝtk. ilustr., gazetojn, afiŝojn ktp. Al ĉiuj antaŭan dankon, ĉiu sendinto ricevos respondon. Adreso: Krasnodar, Societo esperanta, Krasnaja 32, USSR.

Presejo: Uns-Produktivgenossenschaft, Leipzig (Germanio)